

# Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto  
**126**  
aŭtuno 2021



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

## federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

## nia federacio sur Facebook

<http://www.facebook.com/esperantoprovence>

## prezidanto

Pierre Oliva  
Eden Park n° 99  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
06 76 55 57 23  
nlpolecamp@gmail.com

## aliĝkoto (kun la gazeto)

6 €

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la kasisto  
Nicole Lafitte  
(ĉe la supra adreso de  
Pierre Oliva)

## sekretario

### redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain  
48 avenue Alexis Godillot  
83400 Hyères  
06 42 19 68 51  
pascalvilain83@gmail.com

### limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n°

**25-a de decembro 2021**

bonvolu sendi al la supra retadreso

><<>

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

## Vorto de la Prezidanto

Jam venis la kursrekomeno, sed bedaŭrinde plu restas multe da malfacilaĵoj por la bona organizado de niaj aktivecoj; ne ĉiuj lernantoj, ekz., disponas pri la deviga sanpasporto. Mi tamen esperas, ke la kluboj povos denove proponi renkontiĝojn al siaj membroj.

Mi esperas ankaŭ, ke la diverslokaj forumoj de asocioj estis sukcesaj. Pri mia klubo, en Le Beausset, tre malmulte da personoj vizitis la forumon, kiu tamen estis pozitiva, ĉar ni renkontis paron, kiu emas partopreni en nia kurso. Du novaj lernantoj por la venonta semajno, kaj do kontentiga forumo.

Bonan laboron, post la someraj ferioj, kiuj espereble estis agrablaj por ĉiuj.

*Pierre Oliva*



## enhavo

2	staĝoj forumoj de asocioj	8	Provencaj esprimas sin... pentre aŭ fote
4	vojaĝemaj (kaj laboremaj!) samfederacioj	10	paĝo de la komencantoj
6	ZEO en Marsejlo	11	mesaĝkesto nekrologo
7	federacioj esprimas sin... skribe...	12	Esperanto-Sumoo agendo
+	reta suplemento pri Reunio		

## Novembra kultura semajfino

Kutime, la aliĝilo por la staĝo en Le Beausset estas aldonita al nia aŭtuna gazeto.

Ne ĉifoje. La datoj estas jam deciditaj: 27-a kaj 28-a de novembro. La petitaj kursgvidantoj, Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge, pretas vojaĝi al nia regiono... sed pluas la pandemio, kaj la kondiĉoj por restado en la "Maison des Frères" dependos de la sankriza evoluo.

Ni do sendos al vi la aliĝilon en aparta retmesaĝo - aŭ letero - kiam ni certos pri la ebla efektivigo de la staĝo.

## Februara Mediteranea Esperanto-Semajno

*Information envoyée par Christine Graissaguel:*

"Pour MES, comme l'an passé, une date a été retenue: du 26 février au 5 mars 2022. Mais l'assurance ne fonctionne pas en cas de covid; les sommes versées ne sont pas remboursées, seulement reportées à l'année suivante, c'est là le problème.

Voilà la situation ; c'est tout ce que je sais pour le moment."

## Forumoj de asocioj

### La Ciotat (13)

#### Forumo de asocioj en La Ciotat

Pro diversaj kialoj (vakcinado, foresto, vojaĝo) neniuj loka esperantistoj povis deĵori la 11-an de septembro. Feliĉe, ĉe mi estis gastoj, Catherine el Verdun, kiu tre afable informis la vizitantojn. Dankojn, Catherine! Ni inaŭguris la novan tendon, facile munteblan (kvazaŭ pluvombreton) kaj bele videblan. Kiel kutime mankis la junuloj - vizitas emeritoj aŭ familioj kun junaj infanoj - sed ni daŭre semas kaj semas. Sinjorino memorigis tion, kion ni diris al ŝi antaŭ du jaroj! Ĉu ŝi iam aperos en la kurso? Problemo kaj prezento de la strukturo de la lingvo okazos la postan merkredon. Eble la neceso havi sanrajtigilon kaj surporti maskon senkuraĝigos iujn.

*raportis Renée Triolle*



Catherine Kremer, ĉiĉeronino en la bataalkampoj de Verdun, restis kelkajn tagojn ĉe Renée Triolle por viziti sian kuzon, handikapigitan post biciklakcidento, kiu vivas en maljunulejo en Hyères. Ĉiokaze, Pierre kaj Nicole el Le Beausset vespermanĝis kun Catherine ĉe Renée kaj ĉiuj ĝuis agrablan vesperon. Interese estas, ke Catherine profesiigis post "trejnado" okaze de Esperanto-aranĝoj!

### Marseille (13)



#### Forumo de asocioj en Marseille? Ĉu rutina?

Kutima estis la agrabla matenmanĝo ĉe Thierry. Ni timis foreston de la homoj, ĉar pro la sandevigoj, nur 5 000 vizitantoj (triono de la kutima nombro) promenis en Parko Borelly la 12-an de septembro. Ni (Thierry Spanjaard, Marc Gallardo kaj mi) kolektis preskaŭ la saman nombron da adresoj de interesatoj. Ne kutima estis nia alveno: bariloj ĉie, kiujn ni tre sportece transsaltis! Ni konstatis, ke la nova tendo, kvankam belega, estas tre peza.

Aŭdiĝis el buŝoj de 70-jaruloj: "Esperanto? Ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas? Mi neniun aŭdis dum la lastaj dek jaroj!", al kio Thierry rebatis: "Ĉu vi aŭdis iun, kiu parolas islande aŭ tamule? Tamen ili daŭre ekzistas!" En aleo sub bela ombro de arboj, meze de asocioj pri lingvoj, ni ne perdis nian tempon, espereble! Ni vidis la postan mardon, ĉu venos interesitoj okaze de prezento de la lingvo ĉe CIRA, kiu daŭre akceptas nin...

*raportis Renée Triolle*

### Le Beausset (83)

La 11-an de septembro, kiel ĉiujare okazis en nia vilaĝo forumo de asocioj. Pro la viruso kaj la sandevigoj, la festo ne disvolviĝis en plena aero sed en gimnazia sportejo, iom ekster la vilaĝo. Bedaŭrinde, la ena varmeo estis malagrabla, kaj sandviĉoj anstataŭis la kutiman bongustan tagmanĝon sub ombro de arboj. Plie, multe da personoj ne vizitis la forumon, ne nur pro la sankondiĉoj, sed ankaŭ pro la malproksimeco de la vilaĝcentro. Malgraŭ la manko de vizitantoj, ni havis la bonan surprizon registri du lernontojn por niaj kursoj.

Finfine do... sukcesa forumo!

*raportis Pierre Oliva*



### Fréjus kaj Saint-Raphaël (83)



< en Fréjus

en Saint-Raphaël >



Sabaton la 4-an de septembro, la Esperanto-Klubo de Fréjus - Saint-Raphaël partoprenis en la Forumo de asocioj de Saint-Raphaël, apud la marbordo. Dank' al Carmen Segarra, kiu afable alvokis la pasantojn, multe da personoj sin montris interesataj. Ni atendas la sekvojn...

*raportis Denise Loisel*

### Avignon (84)



Dimanĉon la 5-an de septembro, la Avinjona klubo partoprenis en la Forumo de asocioj.

La budo estis bone lokita, kun vido al la fama Ponto Saint-Bénézet.

Deĵoris Rose-Marie Quintin, Roselyne Favier, Olivier Maury, Bernard Bigonnet kaj mi mem.

*raportis Josiane Moirand*

**José Grammatico**, membro de la nun dormanta Manoska klubo, sciigis al nia federacio: "Mi disponas pri multe da Esperanta materialo, kiu kuŝas en mia remizo, kaj mi devas malplenigi la ejon." Fine de aŭgusto, Pierre Oliva kaj Nicole Lafitte vojaĝis al Manosque por plenumi tiun taskon. Kelkaj libroj estos uzataj de la klubo en Le Beausset, dum la cetero iris ĉe Renée Triolle.

La federacio Espéranto-Provence ege dankas al José, nun 96-jara, kiu multegon faris por la Esperanto-agado en Manosque. Li iel tristis pro la endormiĝo de la klubo, en kiu li ĉiam estis tiom aktiva, kaj pro la fakto, ke neniuj emis revigligi ĝin kaj petis de li la disponeblan materialon.

Sed José ne forgesas nian lingvon: ĉu vi scias, ke li havas konstantan rubrikon pri humuraĵoj en Espéranto-info?

## Vojaĝemaj (kaj laboremaj!) samfederacioj....

Renée Triolle

### Sukcesa maratona semajno en Grezijono

Vere maratona estis la 9-taga semajno, kiu okazis de la 23-a ĝis la 1-a de aŭgusto.

Mi mem gvidis kurson por la progresantoj: tri horojn matene kun kafopaŭzo, kaj aldonan gramatikan, vespere je la 18a 30, ĵus antaŭ la vespermanĝo.

Tre agrable estis labori kun ili, ĉar ili reagis, intervenis, respektis la parolon de la aliaj eĉ kiam ni traktis temojn kiel eŭtanazion, atomenergion ktp. Dum la semajno okazis AMO-sesio (sub la gvido de Stefano Mac Gill) por Maturiĝo de la Aktivuloj: ni sekvis rete la intervenojn kaj mi prelegis pri "Esperanto, ĉu interkulturilo?". Mi ankaŭ havis la okazon prelegi pri diversaj temoj, ĉu dum la posttagmezo, ĉu vespere: "Provenco", "Akvo en Provenco", "La ineco de Esperanto", "Franca literaturo en Esperanto" kaj "Victor Lebrun, sekretario de Tolstoj". Dum la distra vespero, mi ankaŭ montris la filmeton faritan de Espéranto-Marseille, "Magia Teo", kiu tre plaĉis.

Ĉu mi aldonu, ke mi ankaŭ organizis ekzamensesion de Franca Esperanto-instituto?

Merkrede, dum la homoj ekskursis al la belaj renesancaj kasteloj, ni ekzamenis kandidatojn pri kapableco pri pedagogio kaj kapableco pri scienco.

Sabate, la tuta tago estis dediĉita al la FEI-ekzamenoj de la 1-a kaj 2-a gradoj.

Sed ne kredu, ke nur mi laboris! Komencantoj studis 5 horojn tage; fluparolantoj sekvis kursaron de Ilona Koutny pri Esperanto kaj lingvistiko aŭ interlingvistiko (laŭ la kurso, kiun ŝi gvidas en la universitato de Poznan, Pollando).

Kaj ĉiuj povis aŭskulti prelegojn pri KOVID, UNESKO, TESP (Teatro ESperanto de PARizo), Renesanco, Fukuŝima nun, eĉ ridi ĉe anekdotoj.

Kial restado en la kulturdomo Grezijono malsimilas al samtipaj aranĝoj? Unue ĝi okazas en kastelo, kun granda parko, en regiono (apud Angers) fama pro siaj mildeco kaj beleco, sed ĉefe pluvivas la "spirito de Grezijono": ne ĝenas fizikiston, profesoron en la universitato, purigi la necesejojn!

Malgraŭ la sankrizo, partoprenantoj povis kunlabori: servi la manĝon, sekigi la telerojn, balai ktp.

Do ne maltrafu la sekvontajn aranĝojn.



fotoj afable disponigitaj de Liba Gabalda

### Pascal Vilain (kiu vojaĝis en nura Vortolando)

Ĉar Renée uzis la vorton Grezijono, dum la responsuloj de la kastelo ŝajne preferas la varianton Greziljono, mi enketis pri ambaŭ vortoj.

### Ĉu Grezijono aŭ Greziljono?

#### Kiuj uzas la nomon «Grezijono»?

- la 2a PIV
- la PIV 2020
- uea.facila
- ILEI
- Edukado.net
- Lernu.net
- TAKE
- .....



## Kiuj uzas la nomon «Greziljono»?

- la nunaj zorgantoj de la kastelo
- Vikipedio (se vi klavumas la vorton «Grezijono», paĝo resendadas vin al «Greziljono»)
- la «reta-vortaro.de»
- la reta vortaro «PreVo»
- SAT-Amikaro
- Esperanto-France (sed antaŭe uzis «Grezijono»)
- la Esperanta Civito
- la revuoj Monato, Kontakto
- .....



## Kiuj uzas ambaŭ vortojn?

- SAT
- la revuo Esperanto, La Ondo de Esperanto
- .....

## Thierry Spanjaard

Mi partoprenis en FIERU! 2021, la GLAT-a Esperanto-Renkontiĝo, kiu okazis de la 21-a ĝis la 25-a de julio en Berlino. Bonvenis tie la tuta GLATa-komunumo: gejoj, lesboj, ambaŭseksemuloj, transgenruloj, kaj krome, ĉiuj aliaj kiuj emis!



Gesperantistoj marŝis kun Esperanto-flagoj okaze de la grandega parado de Berlin CSD Pride, kiu okazis la 24-an de julio.

## Comment espérantiser «GRÉSILLON» ?

Réponse d'André Cherpillod, le 13 janvier 2014, à lire dans la rubrique «Mentions légales» du site : <http://gresillon.org/>

\* On trouve deux formes en présence : Grezijono et Greziljono. Sans aucun doute, Greziljono est préférable.

\* Il suffit de consulter le PIV pour constater que les mots français carillon, cotillon, postillon, vermillon ont été uniformément espérantisés en *kariljono*, *kotiljono*, *postiljono*, *vermiljono*, avec lj. On peut ajouter *Marseljezo*, où le trigramme français ill a été également rendu par le digramme espéranto lj.

\* C'est en effet une constante, chez Zamenhof et tous les "bons auteurs", d'espérantiser les noms propres en ne tenant pas compte de la seule prononciation, mais essentiellement de la graphie.

Ainsi, le PIV nous offre *Ĉampanjo*, et non *Ŝampanjo*, *Ĉarloto*, et non *Ŝarloto*, *Ĉaŭdefono*, et non *Ŝaŭdefono*, *Ĉerburgo*, et non *Ŝerburgo*, *Ĉikago*, et non *Ŝikago*.

Tous ces noms respectent la graphie Ch, et non la prononciation ŝ. C'est une marque supplémentaire de la forte tendance de l'espéranto à tenir compte de la graphie du mot. Or le français Grésillon comporte deux L, qu'il est souhaitable de conserver dans la forme espéranto.

## Alain Rémy



Dume, nia nelacigebla amiko Alain plu biciklas - plej-ofte subpluve! - tra diversaj Eŭropaj landoj.

Neniu dubas, ke li sopiras al retrovo de la Provencaj suno kaj blua ĉielo!

Jen Alain, sur la foto, en la Esperanto-Parko de Budapeŝto, urbo kie li renkontiĝis kun gesperantistoj.

## Josiane Moirand

La staĝo organizita de la klubo "Espéranto chalon-nais", sub la gvidado de Anne-Marie Ferrier, okazis de la 15-a ĝis la 21-a de aŭgusto en la vilaĝo Métabief. Kunvenis 25 geesperantistoj, plejparte francoj el diversaj regionoj kaj paro el Svislando.



Kiel kutime, matene kaj antaŭ la vespermanĝoj okazis kursoj.

- Michel Dechy instruis ĉefe pere de bildrakontoj (Tinĉjo) kaj gazetartikoloj. Li ankaŭ prezentis Esperanton en la feriejo VTF (Vilaĝo, Turismo, Familio) antaŭ dudeko da gejunuloj kaj gepatroj. Pluraj esperantistoj ĉeestis la prelegon.
- Jacqueline Poux instruis al du virinoj, kiuj deziris perfektigi pri esperanto.
- Catherine Kremer gvidis konversacian kurson, paroligante la partoprenantojn. 12 personoj ĉeestis. Kelkaj parolis pri siaj hobiaj: Max donis al ni Pikardan recepton.

## ZEO-oj en Regiono "SUD / PACA" > 12 - Marseille (13)

*Thierry Spanjaard zorgis pri trovado de informoj pri la sola ZEO trovebla (aŭ ne!) en Marsejlo.*

*Jen tio, kion li raportis:*

"Hodiaŭ mi iris al la strato Zamenhof en Marsejlo kun la espero foti platojn evidentigantajn la nomon de la strato. Ĝia oficiala nomo estas la "rue du Docteur Zamenhof" kaj laŭ mia memoro, antaŭ kelkaj jaroj ekzistis almenaŭ unu, verŝajne pluraj stratplatoj montrantaj tiun nomon.

Hodiaŭ mi serĉis je ĉiuj stratfinoj sed trovis nenion! Tamen la strato Zamenhof iras de unu al alia trafikcirklo kaj havas unuflankan vojkruciĝon inter ambaŭ. Tiu povus esti sep ŝancoj trovi nomplaton! Verŝajne kelkaj neniam estis instalitaj aŭ estis ŝtelitaj de fanatikuloj pri Zamenhof, loĝantaj en la ĉirkaŭaĵo, aŭ

Paŭlo prezentis la metodon por krei ĉampanon. Christian rakontis, kiel li transformis sian ĝardenon en fruktodonan legomĝardenon. Jean-Paul rakontis pri sia unua renkonto kun esperanto. Bernard parolis pri la projekto "common voice". Jeannine kaj Josiane priskribis la urbon Constantine.

Dum la kafopaŭzoj, ni povis ĝui diversajn frandaĵojn, kiujn ĉiuj alportis el sia regiono: ĉampanon kaj rozkolorajn biskvitojn el Reims, diversajn vinojn, "Calissons" el Aix, nugaton, fruktojn...

Unu vesperon, Martine Demouy prezentis bildojn kaj rakontis pri vizito al la regiono de Fukuŝima.

Post la tagmanĝo okazis pluraj ekskursoj: piedmigradoj en la Ĵurasa montaro, aŭ vizito de la kastelo de Joux, de mueleja muzeo, de distilejo en Pontarlier (kun gustumado!), de fromaĝfabriko.

Ni vere ĝuis agrablan semajnon kun bela vetero.



simple ili estis detruitaj pro aŭtomobilaj akcidentoj aŭ aliaj kialoj. Fakte, hodiaŭ ne plu estas eĉ unu stratplato kun la nomo Zamenhof en Marsejlo.

Tamen, la nomo daŭre aperas, se oni bone serĉas... Oni facile trovas ĝin sur mapo, kaj sur malmultnombraj privataj ŝildoj sur la strato.





### Pascal Vilain

En la antaŭaj numeroj de *Espéranto-Provence* estis publikigitaj tekstoj, ĉu originalaj ĉu tradukaj, de verkemaj samfederacianoj niaj.

Kelkaj skribas, regule aŭ ne, por diversaj Esperanto-revuoj : Renée Triolle por *Monato*, Internacia Pedagogia Revuo, Literatura Foiro..., Roger Siarri kaj Charles Carrey (Ŝarlerik d'Arroy) por *La KancerKliniko*, Rosy Inaudi por la retejo de Internacia Naturista Organizo Esperantista (INOE), Thierry Spanjaard por *Monato* kaj INOE, Marc Gallardo kaj mi mem por *Monato*...

Aliaj, kies tekstoj aperis en *Espéranto-Provence*, skribas por sia nura plezuro, ekz. Anita Collomb, Fra Gaeta, Jean-Pierre Cavelan (Yanpetro Kavlan), kiu jam eldonis mem plurajn verkojn...

Ĉi-foje, vi povos legi tekston de Michèle Freud, kiu bedaŭrinde forpasis ĉi-jare (vidu je la paĝo 11-a) kaj alian de Jean-Paul Faucher. Ĉi tiu lasta nomo verŝajne estas malpli konata de vi. Jean-Paul estas iama membro de la klubo de Saint-Raphaël. En la franca li verkis poemaron: "Poésies médicales", kaj novelaron: "Les couleurs de la semaine". Jean-Paul foje petis de mi, ke ĉi-lastan mi traduku esperanten. Nu... ne la tutan verkon mi tradukis, sed nuran teksteton ĝian: "Tio ne fareblas".

### Michèle Feud

Vorta bukedo

Frukto de revo, frukto de amo.  
Magia fluo, karese nutra,  
Brilo de juvel', kristal' de neĝo,  
Astra muteco, rigardo stela.  
Rido en ekstaz', guto de liber',  
Blua vualo, feina mister',  
Tulipa ĝarden', ruĝa ciklamen'...  
La vortoj dancas, la vortoj flirtas  
Kaj muzike tintas.  
Subite, ili forvaporigas.  
Tiam, el la muslina nebulo,  
Fiere venas, en verda kostumo,  
Lumiga vorto: jen Esperanto,  
La lingvo de l' koro...



de maldekstre dekstren:  
Michèle Freud, Marie Thierry, Mari-Roza Vilain kaj  
Kazue Sugawara-Audibert, la patrino de nia amikino  
Flavie Wakako Audibert.  
(en Agay, okaze de Mediteranea Esperanto-Semajno, la 5-an de marto 2010)

### Jean-Paul Faucher

Tio ne fareblas!

Pierre Villos duonfrenezigiĝis pro kolero.

Trafis lin marteca pluvego en plena aprilo!  
Preterpasante la urbodomon, li rimarkis, ke la horloĝo indikas la 8-an 17, kiam ĝi devus anonci la 8-an 20.  
En aŭtobuso, li aŭdis malantaŭ si du personojn, kiuj en plena politika diskuto kritikis la nunan aŭtoritataron!

Oficeje, li suferis katastrofan tagon.

Unue, li konstatis, ke S-ro Racht enlifthigas tri pakaĵojn, dum F-ino Athiers eniras ŝarĝolifton, kvankam ŝi portas nuran mansaketon.

Poste, li vidis siasekcie F-inon Ridel, kiu dezirante dreni paneintan radiatoron, enigis moneron en valvo-foldon, kvankam monero neniel eniru foldon. Monero utilas por pago! Kial ne simple peti taŭgan ilon ĉe la enuĝiservo? Plie, akvotubarlaboro ne taŭgas por inoj! Kafeterie, S-ro Daval manĝis sian fromaĝon sen pano, kubutsurtable!

Vespere, Pierre Villois vidis S-inon Delporte, kiu formetis sian kitelon kvin minutojn antaŭ la laborfina sonado.

Rehejmenirante, li kredis, ke finiĝis lia turmento. Sed subite, jen la klimakso! Tie, tute proksime, neniŭ dubo: grupo da germanaj turistoj trairis la straton ekster piedirejo!

Tiam, Pierre Villois radikale decidiĝis:

Al la pluvego, la horloĝo, la buspasaĝeroj, siaj gekolegoj, la germanoj, li rebatu per samaj argumentoj!

Hejmalveninte, li forprenis siajn littukojn, kiujn li alportis al lavistino. Tiu ĉi disponigis al li tute puran littukparon. Li rehejmeniris, pretigis sian liton, pufigis la kapkusenon, lokis glason da akvo kaj libron sur sian noktotablon... kaj iris kuŝiĝi sur la telermeblo de la manĝoĉambro.

*Se ankaŭ vi estas skribema... se vi verkas poemojn, novelojn, eseojn, romanojn... ne hezitu sendi ilin al la redaktoro (ret- kaj poŝtadreso en la kolofono unuapaĝe)*



## Provencanoj esprimas sin... pentre aŭ fote... (sekvo)

*Pluraj membroj aŭ apogantoj de nia federacio havas artan talenton. Ili estis petitaj prezenti sin kaj siajn verkojn. Se ankaŭ vi havas arttalenton kaj ŝatus konigi ĝin, ne hezitu kontakti la redaktoron (kontakthinformoj unuapaĝe).*

### Rosy Inaudi (Les Pennes-Mirabeau)

Mi ĉiam sciis, ke pentrado iĝos por mi pasio, do mi neniam volis enmanigi al mi penikojn, dum mi ne certis pri sufiĉe da disponebla tempo por pentri.

Mi do komencis tion fari, kiam mi iĝis 55-jara kaj anticipis emeritiĝis en 2005. Kvar jarojn poste, mi eksponis ĉirkaŭ kvindek pentraĵojn.

Jen du el miaj preferataj.



#### < La sinjorino kun pareo...

Estas mi... mi ŝatas ĝin, ĉar ĝi perfekte ilustras mian someran vivmanieron.

#### La Kajo de la «Tourette» en Marsejlo >

Ĉi tiu loko estas tre emblema. Eblas vidi du aferojn, kiuj ne plu ekzistas: la Kanalon de la Tourette kaj la Transbordan Ponton. Spite la ŝajnan trankvilecon de la pentraĵo, ĝi bildigas lokon, kiu spertis la plej malbonan aferon, kiun oni povas imagi. Ĉi tio estis amastombejo en Marsejlo dum la pesto de 1720, kie putris ĉiuj mortintoj...

Mi pensas pri tio ĉiufoje, kiam mi rigardas tiun lokon, kaj mi diras al mi, ke ni bonŝancas vivi en la 21-a jarcento !



### Thierry Spanjaard (Marseille)

De kiam mi estis adoleskanto mi fotas.

Mi unue pasiigis pri la teknikaj aspektoj, pasigis multajn jarojn zorgante pri la nigra-blanka laboro en laboratorio, ktp.

Poste, farante kelkajn vojaĝojn, mi konstatis, ke foto ne estas nura reprodukto de realo, sed ke, krome, la rolo de la fotisto estas elekti sian temon, enkadrigi ĝin, elekti kiujn elementojn gravigi, kiujn forgesigi, ktp...



## Du portage à la roue - La route vietnamienne



Fotado signifas skribadon per lumo; tiu bela celo ne ĉiam estas facile atingebla: oni havu taŭgajn lumon, temon, kondiĉojn kaj oni ĉefe kliku je la ĝusta mikro-sekundo, kiam la modelo ridetas, aŭ kiam la birdo tuŝetas la akvosurfacon!

Nuntempe, la tekniko pliboniĝis ĝis punkto, ke apenaŭ plu temas pri tio. La hodiaŭa fotanto povas fokusiĝi pri ĉio alia, kio faras bonan aŭ malsukcesan foton. Tio ne iĝis pli facila.

Tamen mi ĉiam provas fari bonajn fotojn.

Ĉu sukcese?



< Sajgono



< Mui Ne



En la landocentro >

### ***Pascal Vilain (Hyères)***

Je ĉiuj miaj promenadoj, kien ajn mi iras, kion ajn mi faras, neniam mi forgesas kunporti fotilon, kvazaŭan plilongigilon de mia mano.

Kaj plej ofte, ne malsukcesinte mi rehejmeniras, tiel abundaj estas la interesaj detaloj, kiuj nin ĉirkaŭas, kondiĉe ke veran emon trovi ilin ni havas. Ĉar se la rigardon ne ĉiam allogas iu tuto, ĝiaj fragmentoj ofte meritas pli longan observadon.

Detaloj muraj, fasadaj, pordaj, metalplataj...: spuroj, makuloj, ŝvelaĵoj, fendetoj, grataĵoj, ŝiroj...

Fragmentoj de neniam montrita ĉio... tuto-pecetoj... kiel pentraĵoj proponitaj al la rigardo de l' preterpasantoj.

Spontanee, vortoj aldoniĝis al la bildoj: versoj inspiritaj de la eroj, rimoj estigitaj de la fragmentoj...

Miaj bildoj havas la nuran ambicion donaci al vi la flugilojn, kiuj ebligas trovi min en la vasta imaglando.



Okazas fojfoje,  
ke glata murovest'  
subite fendiĝas  
je via preterpas'.

De la mur' estas don'  
de promesa skizet'  
de diskreta ridet'.

## Paĝo de la komencantoj

### Oni parolas ĉiujn lingvojn

Sur la enirpordo de franca hotelo estis afiŝita anonco: "Ici, on parle toutes les langues." ("Ĉi tie oni <sup>1</sup> parolas ĉiujn lingvojn.") Hispana turisto, kiu komprenis la frazon sed malbone parolis france, demandis unue en sia gepatra lingvo, hispane, poste en nia internacia lingvo, Esperante <sup>2</sup>, fine angle kaj germane. Sed al ĉiu demando, la hotelisto respondis france: "Je ne comprends pas. (Mi ne komprenas.)  
- *Mais qui parle toutes les langues dans votre hôtel ?* (Sed kiu parolas ĉiujn lingvojn en via hotelo?) kapablis kolere demandi en la franca la hispana turisto.  
- *Nos hôtes* (Nia gastoj <sup>3</sup>)", trankvile respondis la hotelmastro.

### Klarigoj

**1** : **Oni**, traduction du on français, désigne d'une manière vague une ou plusieurs personnes non mentionnées. **Ni**, comme le nous français, est plus précis. ni = mi + alia(j) persono(j)  
(*Cette distinction a son importance dans la compréhension du petit récit.*)

**2** : Pourquoi une majuscule à "**Esperante**" (= en espéranto), alors que *france, hispane, angle et germane* commencent par une minuscule ? Marque de respect pour notre langue ? Pas du tout. Les mots *esperantisto, esperantigi, esperantologio...* s'écrivent sans majuscule, contrairement à *Esperanto* et *Esperante*.

La raison est simple : il ne faut pas confondre "*esperanto*" = celui qui espère et "*Esperanto*" = la langue ; de même: "*esperante*" = en espérant et "*Esperante*" = en espéranto. Si le sens de la phrase ne prête à aucune confusion, il est tout à fait possible d'écrire "esperanto" et "esperante", sans majuscule, même s'il s'agit de la langue. (Possible par ex. dans le texte ci-dessus.)

**3** : Alors que le français "hôte" peut désigner la personne qui reçoit l'hospitalité ou celle qui la donne, l'espéranto distingue les deux sens du mot:

**gasto** = personne qui reçoit l'hospitalité

**gasti** = recevoir l'hospitalité, loger chez quelqu'un

**gastigi** = donner l'hospitalité, héberger, loger qq'un

**gastiganto** = personne qui donne l'hospitalité



**Plurelekta demandaro**  
laŭ verkoj de Robert Llorens  
eldonitaj de *Espéranto-Info*

### 1 - gramatika

a) Ne plaĉas al mi, ke vi kantas ..... matene ĝis vespere.

1 - al ; 2 - pri ; 3 - de

b) Li preferas sian fraton ..... sia fratino.

1 - al ; 2 - ol ; 3 - kiel

c) Li pli ŝatas sian fraton ..... sian fratino.

1 - al ; 2 - ol ; 3 - kiel

### 2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "besto", "bruto" aŭ "stultulo" por traduki la francan "bête"

1 - animal : .....

2 - d'élevage : .....

3 - inintelligent : .....

d) elektu "bloko", "maso" aŭ "ŝtupo" por traduki la francan "bloc"

1 - de pierre : .....

2 - de bois : .....

3 - informe : .....



**Superzam'**  
proponita de  
Jean-François Cousineau

**1. En kioma jaro okazis la 1a Oceania Universala Kongreso?**

a- 1952 b- 1997 c- neniam

**2. Kiu tradukis "La neĝa blovado" de Pouchkine?**

a- Grabowski b- Zamenhof c- Kalocsay

**3. Kiu titolo de Kajto aperis sur Vinilkosmo-Kompil' 1 en 1995?**

a- Forveturo b- Vosto c- Ansero-vanelo

**4. Kio estis la nomo de la patrino de Zamenhof?**

a- Höpfer b- Silbernik c- Sofer

**5. Kiun literon ĉiam entenas korelativo?**

a- i b- k c- e

**6. Kiu estas la plej ampleksa lando en Eŭropo (krom Rusio kaj sen ekstereŭropaj teritorioj)?**

a- Germanio b- Francio c- Ukrainio

### Plurelekta demandaro

#### 1 - gramatika

a: 3 ; b: 2 ; c: 1

#### 2 - vorto-trezora

ĉ1: streko ; ĉ2: barilo ; ĉ3: stirilo

d1: draŝi ; d2: bati ; d3: pulsi

**Solvoj de la demandoj  
en EP 125  
somero 2021**

### Superzam'

1 a > 1910

2 a > Baghy ; 3 c > Kajto

4 c > Markus ; 5 c > nen

6 c > Niĝerio (163 M loĝ.)



## El la mesaĝkesto de la legantaro

### **Arlette kaj Edmond Plutniak (Arras)**

Bunta, belega kaj interesa revuo. Dankon kaj gratulojn! Ni nur bedaŭras, ke neniu en via federacio partoprenas la mirindan ludon Esperanto-Sumoo, kiu vere instigas al legado kaj interesiĝo al la Esperanto-literaturo. Vi devus informi pri tiu perlo en la venontaj numeroj.

*respondo de la red.*

*Farite (vidu lastpaĝe). Espereble, tio ja instigos al legado en Esperanto.*

### **Martine kaj Max Demouy (Périgueux)**

Dankon pro la sendo de tiu ĉiam tre interesa revuo.

*respondo de la red.*

*Dankon al vi pro via fidela legado!*

### **Thierry Spanjaard**

Via efiko por publikigi nian gazeton estas ĉiam pli granda! La eventoj FestiNatur kaj la Naturista Verda Semajno ĵus finiĝis antaŭ du tagoj kaj la eventoj estas jam raportitaj en la gazeto, eĉ kun fotoj!

*respondo de la red.*

*Mi disponas pri efika kaj faka teamo de raportantoj.*

### **Lucas Perier**

Mi tre dankas vin pro viaj belaj streboj.

*respondo de la red.*

*Kaj mi ĝojas, ke vi en Arles legas nian gazeton. Ĉu vi estas la sola samideano el tiu urbo?*

### **Renée Triolle**

Dankojn pro la redaktado kaj enpaĝigo de la bulteno "Espéranto-Provence".

Kiel kutime, granda sperto raportu pri negravajoj!

Tamen mankas la adreso al kiu sin turni se ni, kiel vi, ŝatas interŝanĝi poŝtkartojn!

*respondo de la red.*

*Vi pravas, Renée. Nur la legantoj de la reta versio povas vidi, ke la lasta blugita indiko «vidu ĉi-tie la aliĝilon» ebligas tujan aliron al la retejo de Esperanto-poŝtkruciĝo. Sed tiu retejo donas nur kontakt-indikon: bildkarto@gmail.com, kiu certe ne utilos al personoj, kiuj ne disponas pri komputilo aŭ ne ŝatas uzi tian aparaton.*

### **Carmen Segarra**

Dankon el Hispanio!

*respondo de la red.*

*Ĉu nia gazeto estas legata en Hispanio? Ĝi do konkurenca Esperanton, Monaton, Kontakton kaj aliajn...*

### **Gabrielle Tête (Oullins)**

Mi multe dankas vin pro via sendo... Estas agrable povi ankoraŭ facile legi en Esperanto, eĉ se mi ne plu povas praktiki la lingvon.

*respondo de la red.*

*Mi scias, ke vi ĉiam pacience atendas novan numeron de nia gazeto. Ĝojigas min, ke ĝi tiel estas ligilo inter iama staĝantino de MES en Agay kaj nia Provenca federacio.*

### **Roger Siarri (L'Île Rousse)**

Mi konstatis eraron en via gazeto. En mia sendita teksto, kiun vi publikigis, mi skribis «mi fariĝos eta eta», sed mi legas sur via gazeto «mi farigos eta eta». Errare humanum est!

*respondo de la red.*

*Jes, Roger, vi pravas, kaj mi konstatis, ke mi plie lasis iun «vilago», kvar liniojn antaŭ tiu «farigos». Mi tamen relegis dekfoje la tutan gazeton. Do, mi tion faros dudekfoje, ekde nun.*

## Nekrologo

La 25-an de aprilo 2021 forpasis en Taradeau (83) **Michèle Freud**, bone konata de multaj membroj de nia federacio. Michèle regule skribis poemojn kaj tekstojn por la iama revuo Laŭte, partoprenis en la agadoj de SAT-Amikaro kaj organizis ties kongreson en Draguignan en 1984. Ŝi ankaŭ estis membro de nia federacio.

La 21-an de septembro 2021 forpasis ankaŭ **Andrée Clément** en La Roque-d'Anthéron (13). Ŝi estis 94-jara. Andrée estis motoro de Esperanto en sia urbeto, regule partoprenis siaurban Ĉerizfeston en junio kaj organizis la nacian kongreson de Espéranto-France en 2004 en La Roque.

Espéranto-Provence sincere kondolencas la familianojn de Michèle kaj Andrée.

## Esperanto-Sumoo

### Sumoo

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro kaj novembro. Unu konkurso daŭras 15 tagojn.

### Esperanto-Sumoo

Esperanto-Sumoo estis elpensita, por ke esperantistoj legu esperantajn librojn. Dum la tempo, kiam dikaj sumooistoj luktas en Japanio, ni esperantistoj legas esperantajn librojn. Antaŭ la aranĝo ni elektas libron, kiun ni legos kaj decidus, kiom da paĝoj ni legos ĉiutage. Se ni plenumas nian tagan taskon, ni havas unu venkon. Tiamaniere ni luktadas 15 tagojn. Sumooistoj en Japanio luktas kontraŭ aliaj luktistoj, sed ni esperantistoj luktas nur kontraŭ malfortoj de nia propra personeco.

### Venonta konkurso

de la 14-a ĝis la 28-a de novembro

### Por pli da detaloj pri la konkursa disvolviĝo

<http://www.esperanto-sumoo.pl/regularo.html>



### À noter sur votre agenda

*Dans les nos 121 à 125, il était écrit ici-même que la crise sanitaire était toujours d'actualité et qu'il ne fallait pas écarter la possibilité d'une nouvelle vague d'attaque virale accompagnée d'une nouvelle période de confinement. Eh bien rien n'a changé, nous en sommes toujours là, et les dates indiquées ci-dessous ne le sont toujours qu'à titre indicatif.*

#### dans notre fédération

##### 1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille

Café linguistique - Brasserie Les Danaïdes  
4 square Stalingrad, 13001 Marseille

##### dernier mercredi de chaque mois - 17 h - Hyères

Café linguistique - bar de l'hôtel Ibis-Gare  
45 rue Edith Cavell (face à la gare)

##### novembre 27-28 - Le Beausset

Stage de fin de semaine organisé par la fédération  
avec l'aide du club local

##### 2022 - février 26 / mars 5 - Les Issambres

MES - Semaine méditerranéenne d'espéranto

(à confirmer)

#### en France

*pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs pour savoir si la programmation est maintenue.*

##### Baugé (49) - Château de Grésillon

<http://gresillon.org/?lang=fr>

##### Bouresse (86) - Kvinpetalo

<http://www.kvinpetalo.org/?lang=fr>

#### octobre 8 - par Internet de 18h à 19h30

Fête de l'automne de Espéranto-France

infos : <https://esperanto-france.org/>

#### 2022 - mai 22-29 - Trélissac (près de Périgueux)

Congrès interassociatif de l'espéranto en France

#### en Europe

#### décembre 27 / janvier 3 - Wiesbaden (Allemagne)

19-èmes rencontres internationales pour fêter le  
Nouvel An

infos : <http://www.esperantoland.org/eo/>

#### ailleurs dans le monde

#### 2022 - août 6-13 - Montréal (Canada)

107ème Congrès universel d'UEA

<https://esperanto2022.ca/eo/chefpagho/>

Vous trouverez aussi la liste de nombreux  
événements, virtuels ou réels,  
sur le très bon site  
[eventa servo](#)

# Esperanto vivas!! Eĉ en Hinda Oceano!

Tre malproksime de Eŭropo, sur eta insulo en Hinda Oceano, okazis internacia Esperanto-renkontiĝo en la suda parto de Reunio, vendredon la 17-an de Septembro 2021.

Kara kaj juna samideano, kiu loĝas en belega vilaĝo, Manapany-les-bains apud Saint-Joseph, havis la bonegan ideon inviti nin en sian ĉarman vilaon kun mirinda ĝardeno.

Post sinprezento de kvar Belgoj kaj tri Francoj kaj kun sata ventro dank'al bongustaj frandaĵoj, ni kune promenis al la baseno ĉe la oceano por plonĝi en la samtempe dolĉan kaj salan akvon sen danĝero de malsataj ŝarkoj: dolĉa akvo pro la suba fonto kaj sala akvo pro la maro.



Plaĝo "Ti-sable"  
kaj ĝia roka marbordo,  
apud la vilaĝo Manapany.



Baseno de Manapany

Reveninte ĉe la gastiganto ni ankoraŭ babilis en Esperanto ĝuante bonan tason da itala kafo aŭ teo.

Antaŭ nia hejmeniro li gvidis nin tra la tipe sovaĝa kaj kreola ĝardeno kun tropikaj plantoj.

Maggy kaj Philippe Combot

